

Heinrich Heine,

Libro de la kantoj, Junaĝaj suferoj, VI

tradukita de Manfred Retzlaff

Nur atendu, vi ŝipisto,
Tuj mi iros for kun vi,
De du inoj mi foriras,
De Eŭropo kaj de ŝi.

Sanga fonto, vi rompiĝu
El la korpo, el la kor',
Ke por mia varma sango
Skribitiĝu la dolor'.

Kial treme nun hodiaŭ
Mian sangon timas vi,
Kvankam staris longajn jarojn
Antaŭ vi sangante mi.

Ĉu ankoraŭ ĝi konatas
Al vi tiu histori'
De serpento, kiu pomon
Donis al pra-ul' de ni?

Same kiel mizerigis
Tiun nia pra-patrin',
Tiel ankaŭ vi min tentis,
Tute vi detruis min.

...

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Junge Leiden, VI" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1983.*

MR-137-1 / Arg-707-1422 (2012-12-07 12:35:37)